



FLANDRA ESPERANTISTO

MONATAJ REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO:

Al Niaj Amikoj. -- la Flandra Kongreso de Esperanto. -- Kion vi ŝatas? -- 1830-1930. -- Esperanto door Zelfonderricht: Tiende les. -- 22a. Universala Kongreso de Esperanto. -- Flandra Kanto Esperantigita. -- Korespondado. -- Ĉe la Flandraj Blinduloj. -- Kiel la Ligo de Nacioj forĝas la Pacon! -- Gratuloj. -- Nekrologo. -- El Irlando. -- Inter Ni. -- Flandra Ligo Esperantista. -- Bibliografio. -- Ricevitaj Revuoj. -- Subteno por nia revuo.

JARA ABONPREZO : 15 frankoj. -- Eksterlando : 4 belgoj.

Por membroj de Flandra Ligo Esperantista senpage.

Tarifo por anoncoj : 1/1 paĝo, fr. 125.—; 1/2 paĝo, fr. 70.—;

1/4 „ , fr. 40.—; 1/6 „ , fr. 30.—;

1/8 „ , fr. 25.—. Perantoj ricevas rabaton.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 15 frankoj. — Eksterlando : 4 belgoj.
 Por membroj de "Flandra Ligo Esperantista" senpage
 Poŝtĉeko : 1735.09

AL NIAJ AMIKOJ.

Kun ĉi tiu numero nia 1a. jaro finiĝas.

Kun fiero ni povas rigardi malantaŭen : regule nia revuo aperis ĉiumonate ; la enhavo estis ĉiam interesa.

Tiuj, kiuj deziras bindigi la revuon (estos bele ilustrita 200-paĝa libro !) atentu, ke nia sekvonta numero enhavos titolpaĝon kun enhavo por la 1a. jarkolekto.

Por la 2a. jaro la abonprezo estos 15.— fr. por la enlandaj kaj 20.— fr. (4 belgoj) por la eksterlandaj abonantoj. La membroj de Flandra Ligo Esperantista ricevos nian revuon senpage.

Ne nur reabonu vi mem kiel eble plej baldaŭ, sed klopodu abonigi ne jam abonintan samidean(in)on ! Se **ĈIU** el niaj nunaj abonantoj varbas nur **UNU** novan abonanton la ekzistado de nia revuo estas certigata.

Al niaj abonantoj, pro ilia fido, —

Al niaj subtenantoj, pro ilia malavareco, —

Al niaj kunlaborantoj, pro ilia helpemo, ni esprimas ĉi tie nian sinceran dankon.

Niaflanke ni promesas al niaj amikoj, ke ni streĉos ĉiujn niajn fortojn por plibeligi, pliinteresigi, pliampleksigi la revuon de ĉiuj flandraj esperantistoj :

FLANDRA ESPERANTISTO.

1a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO

Antverpeno. 7an-8an-9an de Junio 1930.

Honora Prezidanto: S-ro Frans Van Cauwelaert, urbestro.

PROGRAMO.

Sabate.

- 7a. Malfermo de la akceptejo en la salono Van Wezenbeke, Van Wezenbekestraat.
- 7½a. Parolado de S-ro Berger Bertalan, ĵurnalisto, el Rio de Janeiro, pri Brazilo, en la sama salono.
- 8a. Kabaredvespero. Sol- kaj kunkantado, muziko, humoraĵoj, dancado, k. t. p. en la sama salono.

Dimanĉe.

- 9a. Esperanta Diservo kun prediko de lia monaĥa Moŝto J. Decoene, redemptoristo, doktoro en filologio kaj filozofio kaj prezidanto de la Belga Katolika Ligo Esperanta, en la preĝejo de la Redemptoristoj, Hopland.

Dum la meso oni kantas kelkaj kantojn esperantlingve kaj post la meso oni diros la preĝojn en Esperanto.

- 10a. Oficiala akcepto en la urbodomo.
- 11a. Laborkunsido de Flandra Ligo Esperantista en la festsalono de la Reĝa Ateneo, Victorieplaats. Salutparoladoj kaj priparolado de diversaj organizaj aferoj.
 - 1a. Fotografado de la kongresanoj antaŭ la flandra Operejo, Frankrijklei.
 - 2a. Festeno en la restaŭracio Verlaet, Sint-Jansplaats (prezo: 25.— fr.).
 - 4a. Promenado tra la urbo.
 - 8a. En la salono "Patria", Lange Leemstraat: *Arta Koncerto*, kun la kunlaboro de f-ino Swalf, kantistino; f-ino Parkinson, pianistino; s-ro Vermuyten, deklamisto, kaj la kvarteto Rafaël.

Disdonado de diplomo al la laŭreatoj de la ekzameno organizita de Flandra Esperanto-Instituto.

Parolado de S-ro Jan Jacobs, prezidanto de A. P. P. K.

REPREZENTADO DE BIETJE

Unuakta Teatraĵo de Maurits Sabbe.

Tradukita de D-ro W. Van der Biest.

Personoj.

- Jean-Baptiste*, notarioficisto, 65-jara . . . S-ro Gommer Torfs.
Monne, lia frato, duon da jaroj pli juna . . . S-ro Juul Karnas.
Bietje, baptofilineto de Jean-Baptiste, 16-jara F-ino Martha Vervloet.
(En Flandrujo, dum la jaro 1840 proksimume).

Lunde.

- 9a. Vizito al la Urba Navigacia Muzeo, gvidata de s-ro Em. Beuckeleers-Donche, muzeestro.
10a. Vizito al la mondekspozicio.
9a. Sonorilarkoncerto sur la ĉefpreĝejo; ludado de "La Espero".
10a. Oficiala adiaŭo en "Pannenhuis", Conscienceplein, 3.

Atentu. — La eksterurbaj kongresanoj ricevos sian kongreskarton kaj la karton por la fervojrabato antaŭe; ĉiujn aliajn dokumentojn ili ricevos en la akceptejo. La Antverpenaj kongresanoj tie ricevos *ĉiujn* dokumentojn.


*
*
*

Flandraj esperantistoj, la Antverpenaj samideanoj atendas vin dum Pentekosto, por — je l'unua fojo — en granda rondo familio ariĝi por festi la fondon de la Flandra Ligo Esperantista.

Nia Skeldurbo, la ĉefubo de Flandrujo, estas sufiĉe konata pro sia gastamo, por ke ni ne devu insisti pri tio!

La organiza komitato zorgis, ke la kongresistoj pasigos kelkajn neforgeseblajn tagojn en Antverpeno. Ne nur kun viaj samlandaj samideanoj vi povos interkonatiĝi sed ankaŭ kun kelkaj eksterlandaj. Jes, ankaŭ ekster la landlimo nia kongreso allogis la samideanojn.

Se vi ne jam aliĝis, vi faru tion tuj ĉar nenia maleblaĵo ekzistas, kiam oni *volas*. Estas nur pretekstoj. Tial estu en Antverpeno dum Pentekosto!



KION VI ŜATAS?

<i>Esperanton kiel industrio?</i>	<i>Esperanton kiel idealo?</i>
<i>Esperanton kiel distraĵo?</i>	<i>Esperanton kiel kulturfaktoro?</i>
<i>Diktatoron?</i>	<i>Komunan interkonsenton?</i>
<i>Esperanton kiel tria lingvo?</i>	<i>Esperanton kiel dua lingvo?</i>
<i>Humiligon de via gepatra lingvo?</i>	<i>Honorigon de via gepatra lingvo?</i>
<i>Patriotismaĉon?</i>	<i>Pacifismon?</i>
<i>Kaŝajn intrigojn?</i>	<i>Malkaŝan sincerecon?</i>
<i>Pseŭdo-neŭtralismon?</i>	<i>Respekton por ĉies opinio?</i>

Tiam iĝu membro de

BELGA

FLANDRA

LIGO ESPERANTISTA

Tiam aliĝu al la

BELGA

FLANDRA

KONGRESO DE ESPERANTO.

1830 - 1930.

Funebra Datrevena Festo por la Flandroj.

D. ĈE LA JUĜISTARO.

1844. La flandra verkisto Domien Sleeckx ekprocesas kontraŭ la brusela skabeno Verhulst, ĉar ĉi tiu rifuzis redakti la naskiĝakton de la infano de Sleeckx nederlande. La postulo de la Flandro estis rifuzata.
1860. Du la francan nesciantaj Flandroj, Jan Coucke kaj Pieter Goethals estas, kiel kulpaj je rabmurdo, senkapigataj en Charleroi. La tuta proceduro estis estinta franca kaj kiel tradukanto funkciis... luksemburga Valono, kiu dum sia soldattempo en Antverpeno estis lerninta kelkajn flandrajn vortojn. En 1862 la nomita Leclercq — Valono — konfesis sur sia mortlito la krimon. Vane oni depost tiam petis la rehonorigon de Coucke kaj Goethals. Sekve de tiu afero... *la unua flandra lingvoleĝo estis akceptata en 1873!*
1863. Je l' peto de l' akuzato, Jakob Karsman, la advokatoj Julius Vuylsteke (Gent) kaj Brack (Antwerpen) deziras pledi nederlande en gazetproceso antaŭ la brusela Apelacia Kortumo. La Kortumo, plejparte konsistanta el valonaj juĝistoj, rifuzis ĉi tion kaj... pli-altigis la punon de Karsman de 5 frankoj da monpuno je 3-monata enkarcerigo.
1873. Geeraard Schoep estas kondamnata de la brusela Kasacia Kortumo je 50 frankoj da monpuno, ĉar li ne sciigis la naskiĝon de sia infano. Li ja estis farinta tion sed... flandre, kaj ĉi tio estis konsiderata kiel senvalora.
1910. La nur-la-flandran parolanta antverpena havenlaboristo, J. Gosselet, estas kondamnita estanta senkulpa je enkarcerigo, sekve de interbatalo. La tuta proceso okazis france. La vera kulpulo konigas sin post kelkaj semajnoj kaj Gosselet povas, sen ia kompensaĵo, piede reiri al sia malsatanta familio en Antverpeno.
- 1918-19. La ĝenerala prokuroro ĉe la lieĝa Apelacia Kortumo avertas en cirkulero al la enketaj juĝistoj kontraŭ "scrupules de légalité" (leĝecaj skrupuloj), sekve: 43 flandraj aktivistoj estas kondamnatataj je mortpuno aŭ ĝismorta punlaboro; 137 je entute 1527 jaroj da enkarcerigo; 3000 familioj estas senpanigataj, 300 flandraj gvidantoj pelataj en ekzilon. Krom tio la flandraj aktivistoj estas kondamnatataj je tre gravaj konfiskoj; ĉi ĉio laŭ Dekret-leĝo akceptita en Le Havre la 8 an. de Aprilo 1917, sed ne proklamita en la okupita regiono. Kontraŭleĝe ĉi tiu senvalora Dekret-leĝo estis deklarata aplikebla, kun pasinta valoro, de la belga parl-

amento, kvankam la packontrakto de Versajlo en sia art. 212 difinas, ke neniu povas esti persekutata pro militagoj. La fama juristo Edmond Picard, kiun oni ne volis permesi kiel atestanto-ekspertizisto, resendis indignigite sian ordenon de Leopoldo al la registaro.

1923. Lieĝa studento, Georges Rogissart, mortpafas sian amatinon. La reĝa prokuroro, s-ro Delwaide, diris al la ĵura alsidantaro: "Mi ne petas de vi la maksimuman punon, ĉar eĉ se ĉi tiu viro estus kondamnata je ĝismorta punlaboro, eĉ tiam li ankoraŭ, dank' al "ĉiopova protekto" kiun li havas, ne pasigus 3 jarojn en la malliberejo..."

Kaj la murdisto estis... deklarata nekulpa!

1923. En Aprilo bombo estas trovata antaŭ la pordo de la franca konsulejo en Lieĝo. Enketo elmontras, ke la "trovinto" de la bombo — la enketa juĝisto Charles Phillipart el Namuro — mem metis ĝin tie esperante tiamaniere akiri francan ordenon! (Rotterdam-sche Courant, 30 an. de Novembro).

Ĉi tiu afero kompreneble estis kaŝata en la forgesujon!

1923. Dum la Grand-nederlanda Kongreso dum Aprilo en Loveno, la Valono Colbacq mortpafas sian flandran kunstudenton Berten Vallaeys kaj konfesas, ke li agis pro "rasfanatismo". Li tamen restas provizore libera kaj nur en Septembro 1925 li estas kondiĉe kondamnata je 4 monatoj kaj 15 tagoj da enkarcerigo kaj 14.000 frankoj da kompensago.

1924. La valona minmagnato Barono Coppée, depost 1920 kulpigata je liverado dum la germana okupado 1914-'18 de karbo kaj benzolo al la malamikaj soldataro kaj militŝiparo, estas en Aŭgusto deklarata senkulpa de la brusela Krima Kortumo post favora atesto de kardinalo Mercier.

1925. La flandra nacionalisto Remi de Man, estinta militoficiro, estas en Septembro 1924, post flandra manifestacio en Bruselo, atakata kaj batata. Li mortpafas la ĉefon de l' bando, Clément Maquet. Li tuj estas enkarcerigata kaj en Januaro kondamnata je 3-jara enkarcerigo kaj 50.000 fr. da kompensago.

De la Kasacia Kortumo en Bruselo li estas en Februaro liberigata, ĉar li agis pro memdefendo. Sed... laŭ insistado de la ĝenerala prokuroro la unua verdikto estas en Oktobro denove sankciata de la Apelacia Kortumo en Gento! La Flandroj kolektas dum kelkaj tagoj pli ol 200.000 frankoj.

1925. Francemaj studentoj en Novembro perforte penetras en la hejmon de la flandrema profesoro Van Bogaert en Gent kaj batas lin. Ili

estas juĝe persekutataj: la aferon oni ĉiam prokrastas dum 13 monatoj. Tiam la kulpuloj estas deklarataj senkulpaj ĉar la plendo estis "jara".

La saman tagon flandra popolknabego estas kondamnata en Loveno je 1000 fr. da monpuno, ĉar li estis disdoninta flandrajn propagandfoliojn!

1929. La registristo kaj pacjuĝisto de la kantono St-Jans-Molenbeek rifuzas al parenckonsilantaro liveradon de nederlandaj dokumentoj, kiel tion petas la interesulo, s-ro Van Landuyt, urba konsilanto el Molenbeek.

La juĝoficistoj pravigas sin per cirkulero de la ĝenerala prokuroro.

1929. La franca traduko de flandra broŝuro de Jan Terzake aperis kun ne ĉiuj postulitaj indikoj pri la eldonejo, kiuj ja estas troveblaj sur la flandra eldono. La flandraj verkisto, eldonisto kaj presisto estis ĉiuj senkondiĉe kondamnataj je la punmaksimumo. Pro sensignifa forgeso *Flandroj* estis severe punataj dum oni malatentas ĉiutage pri pli gravaj prespreterlasoj.

1929. El intervjuo de advokato Van Hoeck en "La Nation Belge" de la 14a. de Aŭgusto:

— "La 10an. de Junio mi aperis antaŭ la Alta Apelacia Kortumo por helpi flandran militvidvinon. — La prezidanto tute ne komprenis la flandran, kvankam li tiun tagon devis demandi "32 invalidojn kaj 3 militvidvinojn, ĉiuj flandroj.

"La Kortumo atentigis min pri la fakto, ke "franca" pledado "havas bonan influon favore de mia klientino..."

K. A.

Esperanto door Zelfonderricht.

TIENDE LES.

Vertalingen der negende les.

Traduko. — La lernantoj estis laŭdataj de sia lernejestro. Vi estas amata de via patrino. Mi ne sciis, ke la letero estis alveninta. Tiu artikolo estas skribita de mi, mi ne hontas pri tio. Kontraŭe mi fieras pri tio. La policisto, kiu kaptis la ŝteliston, kiu estis ŝtelinta mian poŝhorloĝon, ricevis de mi malgrandan rekompencan. Mi estus veninta al la festo, sed mi tute ne povis: grava malsano devigis min resti en la lito. La lernantoj estus estintaj laŭdataj de sia profesoro, se ili estus farintaj siajn tradukojn sen eraroj. Mi estas tradukanta "Ernest Staes" de Tony. La Angloj pliriĉigis sin per la komerco. Ĉu estas vere, ke vi skribis ĉi tiun leteron?

Vertaling. — Dat huis wordt door een gekend bouwkundige gebouwd; de bouw zal slechts na vier maanden geëindigd zijn. Voor een tentoonstelling bouwt men vele schoone paleizen, maar de meeste van hen sloopst men na de sluiting van de tentoonstelling. Vloeiend water is zuiverder dan stilstaand water. Uwe brieven zijn steeds heelemaal onleesbaar geschreven. Geld dat men heeft is belangrijker dan geld dat men had. Ik zou de vergissing niet doen, indien hij mij de waarheid gezegd had.

— De deelwoorden kunnen gebruikt worden als naamwoorden: *prezidanto*, **voorzitter**, voorzittende; *amato*, beminde, die bemind wordt; *amatino*, beminde (vrouw); *savinto*, redder, die redde; enz.

— De deelwoorden worden ook als bijwoorden gebruikt: *Kantante*, *ŝi eliris*, — al zingende, ging zij buiten; *aklamate*, *li finis*, — toegejuicht, eindigde hij, enz.

Nog enkele, de laatste, achtervoegsels zijn:

— *ing*, dat het voorwerp aanduidt, waarin men iets steekt: *cigaredingo*, sigarettenbuisje; *kandelingo*, kandelaar; *ovingo*, eierkroesje; enz.

— *uj* vormt de namen van voorwerpen die iets inhouden, benevens de namen van boomen en landen: *cigaredujo*, sigarettenkoker; *sukerujo*, suikerpot; *pirujo*, perelaar; *Flandrujo*, Vlaanderen; enz.

— *ul* duidt den persoon aan welke het karakter of de eigenschap bezit door het grondwoord uitgedrukt: *flandremulo*, Vlaamschgezinde; *avarulo*, gierigaard; *junulino*, jong meisje; enz.

— *ist* wijst het beroep aan: *instruisto*, onderwijzer; *kudristino*, naaister; enz.

— *il* duidt het werktuig aan: *kudrilo*, naald; *flugilo*, vleugel; *hakilo*, bijl; enz.

— *ind* duidt de waardigheid aan: *leginda*, lezenswaardig; *bedaŭrinda*, spijtig; *kredinda*, geloovenswaardig; enz.

— *ig* beteekent iets doen of iets of iemand in een zekeren toestand brengen: *bruligi*, doen branden; *purigi*, kuischen; *troigi*, overdrijven; enz.

— *iĝ* beteekent worden: *paliĝi*, verbleeken; *grandiĝi*, groot worden; *beliĝi*, schoon worden.

— Wanneer het onderwerp de handeling op zich zelf of een ander uitoefent gebruikt men *igi* met het persoonlijk voornaamwoord: *ŝi beligas sin*, zij maakt zich schoon; *vi paligas min*, gij doet mij bleek worden; enz.

Vertaal. — Wij stappen zingend langs de baan. Al wandelend door de stad ontmoette ik vele bekenden. Niemand weet reeds wie de

overwinnaar zal zijn. Dit mooi sigarenbuisje ontving ik van mijn be-
minde. Een vingerhoed zet men niet op den kop. Er viel een vlieg in
den soeppot. Bij de blinden is de éenoogige koning. Gelukkig zijt gij,
rijken. Een tuinier heeft gedurende de oogsttijd doove ooren, zegt een
Perzisch spreekwoord. Schoenmaker blijf bij uw leest. De pillen der
apothekers zijn schoon, maar inwendig bitter. Het herkenningsteeken
van anti-militaristen is een gebroken geweer. Een naald zonder punt is
van niet veel nut. Al wat blinkt is geen goud. Ik ben niet waardig voor
u te verschijnen. Gij zult niet dooden. Zij worden stilaan oud. Hoevele
mensen reinigen hun lijf, maar nooit hun ziel. Gij overdrijft de zaken!
Heelemaal niet! Wij zullen de bedriegers ontmaskeren. De waarheid
vinden willen is een verdienste, zelfs dan wanneer men zich van weg
vergist.

Woordenlijst. — Stappen, marŝi; ontmoeten, renkonti; over-
winnen, venki; vlieg, muŝo; oogst, rikolto; doof, surda; Perzisch,
persa; schoen, ŝuo; leest, ŝtipo; pil, pilolo; bitter, maldolĉa; herken-
ningsteeken, insigno; punt, pinto; nut, utileco; blinken, brili; ver-
schijnen, aperi; stilaan, iom post iom; overdrijven, trograndigi; be-
driegen, trompi; masker, masko; verdienste, merito.

Traduko. — Estas varme hodiaŭ. Antaŭen, amikoj, ne timante
la danĝeron. Promenante sur la strato mi falis. Pardonu al mi, ĉar mi
alvenas tute neatendite. Ne gravas, vi ĉiam estis bonvena. La ŝtato ne
estas la patrujo (Romain Rolland). Tiu belulino ne jam estas edziniĝinta.
Ne ĉiu estas muzikisto, kiu portas violonon sub la brako. Per hakilo ni
hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per
tondilo ni tondas kaj per tranĉilo ni tranĉas. Li estas nekredinda viro.
Bedaŭrinde, ne ĉiuj pensas kiel vi. Ŝi ruĝiĝis dum lia ĉeesto. Dum la
milito multaj riĉiĝis sin mem kaj malriĉiĝis la popolon. Kiel vi mal-
dikiĝas! Mi estas kontenta pri tio.

Woordenlijst. — Grava, erg; ŝtato, staat; violono, viool; segi,
zagen; fosi, graven; tondi, knippen; tranĉi, snijden.

Vertalingen der tiende les.

Traduko. — Ni marŝas kantante sur la vojo. Promenante tra la
urbo mi renkontis multajn konatulojn. Neniu jam scias kiu estas la
venkonto. Ĉi tiun belan cigaredingon mi ricevis de mia amatino. Fing-
ringon oni ne metas sur la kapon. Falis muŝo en la supujon. Ĉe la
blinduloj la unuokululo estas reĝo. Feliĉaj vi estas, riĉuloj. Ĝardenisto
havas dum la rikolttempo surdajn orelojn, diras persa proverbo. Ŝuisto
restu ĉe via ŝtipo. La piloloj de la apotekistoj estas belaj, sed interne
maldolĉaj. La insigno de kontraŭ-milituloj estas rompita pafilo. Kudrilo
sen pinto ne estas tre utila. Ĉio kio brilas ne estas oro. Mi ne indas
192

aperi antaŭ vi. Vi ne mortigu. Ili iom post iom maljuniĝas. Kiom da homoj purigas sian korpon, sed neniam sian animon. Vi trograndigas la aferojn! Tute ne! Ni senmaskigos la trompantojn. Volo por trovi la veron estas merito, eĉ tiam kiam oni eraras pri la vero.

Vertaling. — Het is warm vandaag. Vooruit, makkers, het gevaar niet vreezend. Al wandelend langs de straat, viel ik. Vergeef mij, dat ik heelemaal onverwacht aankom. 't Is niet erg, gij waart steeds welkom. De staat is niet het vaderland (Romain Rolland). Die schoone is nog niet gehuwd. Niet ieder is muzikant, die een viool onder den arm draagt. Met een bijl hakken wij, met een zaag zagen wij, met een spade graven wij, met een naald naaien wij, met een schaar knippen wij en met een mes snijden wij. Hij is een niet-geloofwaardig man. Ongelukkiglijk denken niet allen als gij. Zij werd rood in zijn bijzijn. Gedurende den oorlog verrijkten velen zich zelf en verarmden het volk. Wat wordt ge mager! Ik ben er tevreden over.

Aan de Leerlingen.

Onze kursus "Esperanto door Zelfonderricht", voor diegenen onzer lezers die nog niet met Esperanto vertrouwd waren, nam hiermede een einde. Wij hopen echter dat onze leerlingen het bij deze eerste kennismaking niet zullen laten en hunne kennissen zullen uitbreiden; wij, van onzen kant, willen hen daarbij behulpzaam zijn door het afkondigen in onzen 2^{den} jaargang van eene reeks "*Vlaamsch-Esperanto Samenspraken.*"

22a. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Oxford — 2a.-9a. de Aŭgusto 1930.

GRAVAJ KLARIGOJ.

1. — Laŭ decido de la Centra Komitato la kotizo por ĉiu Kongresano estas senescepte £ 1. (Post la 1a de Julio 1930 la kotizo estos 30 ŝilingoj.)

2. — Ĉiu Kongresano ricevos senpage la dokumentojn de la Kongreso, sed nur post la tago de sia enskribiĝo.

3. — Tuj post la ricevo de la kotizo la Loka Kongresa Komitato sendos provizoran karton al la Kongresano. Iu, ne ricevinta en bona tempo sian provizoran karton, estas petata sciigi tion al la Komitato.

4. — En konvena tempo ĉiu Kongresano ricevos diversajn mendilojn por loĝado, kongresaj eldonaĵoj, k.t.p.

Ĉiujn pagojn al la Kongreso oni povos fari per Britaj Ŝtatabiletoj aŭ per Poŝtmandatoj — sendotaj rekte al la Kongresa adreso: 142, High Holborn, London, W. C. 1, Anglujo.

FLANDRA KANTO ESPERANTIGITA.

Nia Patrolando.

Teksto de Th. SEVENS.

Kie Moz' kaj Skeldo fluas,
Kie Norda maro bruas,
Kie en la kverk-arbar'
Resonadas vent-kantar' :

Rekantajo

Jen nia patroland',
La sankta land',
Nia kara Flandroland'!

Kie kuŝas en tombaro
De l' gepatroj la ostaro,
Nin dormigis la patrin'
Kaj l' edzino kisas nin :

Rekantajo

Vivu la patroland', k.t.p.

Muziko de JAN BLOCKX.

Kie kapon ne klinigis
Gildoj nek sin submetigis
Kaj batalis ĝis la mort'
Kontraŭ fremda militfort' :

Kie nur per flandraj sonoj
Kantiĝadas psalmaj tonoj,
Kie forta batalson'
Kriis: "Flandra la leon'!"

En ĝojeg' kaj en doloro
Kuŝas ĝi en nia koro,
Kaj fidelaj nur al ĝi
Ĝis la morto kantu ni :

Tradukis O. VAN SCHOOR.

KORESPONDADO.

— Gekursanoj, kiuj baldaŭ finos esperantan kurson, deziras korespondi letere kaj poŝtkarte kun ĉiulandaj esperantistoj, sed precipe kun anoj de malgrandaj, subpremataj popoloj. Respondo garantiita. Skribu al: Flandrema Grupo Esperantista, Conscienceplein, Antwerpen.

— S-ro Alfons Spaenhoven, 40, Walburgstraat, St. Niklaas-Waas, Belgujo, deziras viglan interŝanĝon de poŝtmarkoj. Certe kaj akurate respondas.

— La filatelie sekcio de "Al Triumfo" afable petas la eksterlandajn geamikojn, ke ili sendu sian adreson al la sekretario s-ro Van Ghendt, 75, Wegvoeringstraat, St. Niklaas-Waas, Belgujo.

ĈE LA FLANDRAJ BLINDULOJ.

Depost 10 jaroj la Flandroj petas sensukcese subtenon por la starigo de flandra blindulpresejo.

Laŭ la regularo de la "American Braille Press for War and Civilian Blind, Inc.", la blinduleldonaĵoj devas okazi en "ĉies respektiva lingvo".

Tamen al peto por eldono de flandra blindulegaĵo la "Ĝenerala Blindulunuigo de Flandrujo" ricevis jenan leteron :

AMERICAN SECTION
From the High Patronage of
President of the United States
(1917)

BRITISH SECTION
Under the High Patronage of
His Majesty the King
Her Majesty the Queen

FRENCH SECTION
Under the High Patronage of
D. Caillaud-Macqueron
President of the Republic

BELGIAN SECTION
Under the High Patronage of
His Majesty the King
Her Majesty the Queen

ITALIAN SECTION
Under the High Patronage of
His Majesty the King
Her Majesty the Queen

ROMANIAN SECTION
Under the High Patronage of
His Majesty the King
Her Majesty the Queen

JUGO-SLAVIAN SECTION
Under the High Patronage of
His Majesty the King
Her Majesty the Queen

OFFICERS

WM. NELSON CROMWELL
President
SAMUEL W. FAIRCHILD
Vice-President
ALVIN W. KRECH
Chairman, Equitable Trust Co
Treasurer General
H. W. BIECKEN
Secretary General, New York
GEO. L. RAVERAT
Foreign Secretary, Paris

EXECUTIVE COMMITTEE

WM. NELSON CROMWELL
Chairman
SAMUEL W. FAIRCHILD
ALVIN W. KRECH
JAMES M. BECK
JAMES W. GERARD
T. TILSTON WELLS
ROGER L. FARNHAM
MAX SHOOP
JOHN FOSTER DULLES
Vice Chairman

BOARD OF DIRECTORS

JAMES M. BECK
WM. NELSON CROMWELL
JOHN FOSTER DULLES
SAMUEL W. FAIRCHILD
ROGER L. FARNHAM
JAMES W. GERARD
OTTO H. KAHN
ALVIN W. KRECH
REV. CHARLES S. MACFARLAND
JULIUS W. MAYER
MORGAN J. O'BRIEN
L. LIVINGSTON SEAMAN
MAX SHOOP
REV. ERNEST M. STIRES
T. TILSTON WELLS

DISTRIBUTION AND CIRCULATION
OF BRAILLE LITERATURE FOR
WAR AND CIVILIAN BLIND IN

UNITED STATES OF AMERICA
ENGLAND (British Empire)
FRANCE
BELGIUM
ITALY
ROMANIA
JUGO-SLAVIA
POLAND

In their respective languages

AMERICAN BRAILLE PRESS

For War and Civilian Blind, Incorporated

(COMITÉ AMÉRICAIN DE SECOURS AUX AVEUGLES)

NEW-YORK: 730 FIFTH AVE.

TELEPHONE: CIRCLE 0235 CABLES: *RELIEFER.

PARIS: 74 RUE LAURISTON.

TELEPHONE: PASSY 44-41 CABLES: *RELIEFER.

Paris, le 19 Mai 1926.

Monsieur Fiten Viktor,
Secrétaire de la Fédération Générale
des Aveugles Flamands,
35, rue Arthur de Grootstraat,
Anvers (Ouest), Belgique.

Monsieur,

En réponse à votre lettre du 12 ct.
j'ai le regret de vous informer que le "Courrier
Braille - Edition Belge" que nous nous proposons
de faire paraître pendant trois mois à titre
d'essai, à partir du 1er Juin, sera rédigé en
langue française, le flamand ne faisant pas
actuellement partie de notre programme.

Veuillez agréer, Monsieur, l'expression
de nos sentiments distingués.

AMERICAN BRAILLE PRESS, Inc.,

Geo. L. Raverat
Foreign Secretary.

Purposes extended to Civilian Blind and Change of Name from PERMANENT BLIND RELIEF WAR FUND made pursuant to laws of New York

La enhavo tekstas esperante :

"Responde al via letero de la 12 a. ĉ. m. mi kun bedaŭro informas vin, ke la "Courrier Braille-Edition Belge", kiun ni intencas aperigi dum tri monatoj kiel provo, depost la 1a. de Junio, estos redaktata franclingve, la flandra ne estanta nuntempe parton de nia programo."

Oni ne forgesu, ke la 9 milionoj pri kiuj disponas la "American Braille Press" devenas ĉefe de la Belga Nutradkomitato kaj estas do plejparte flandra mono!

La flandra delegitaro dum la lasta blindulkongreso en Vieno petis klarigojn, sed s-ro de Raverat — anstataŭ respondi — forkuris el la kongresejo!

En la belga parlamento oni jam interpelaciis pri tiu afero, diversflanke oni apogas la agadon de la flandraj blinduloj; ni esperu do, ke baldaŭ la flandraj blinduloj havos propran blindulpresejon, propralingvajn legaĵojn!

KIEL LA LIGO DE NACIOJ FORĜAS LA PACON!



For la armilfabrikantoj! For la liverantoj de “nekonataj soldatoj”! For la ekspluatantoj de falsa patriotismo!

GRATULOJ.

— Al Gesinjoroj Herman Elen-Claassens, ambaŭ fervoraj flandraj esperantistoj, pro naskiĝo de fileto Walter.

NEKROLOGO.

La 25-jara edzino de nia samideano Julien Terryn, el Gent, mortis la 17an. de Majo. Ni prezentas al nia nekonsolebla amiko, al liaj tri filinetoj kaj al la tuta funebranta parenkaro niajn sincerajn kondolencojn.

EL IRLANDO.

La nuna Tasko.

En sia parolado okaze de vizito al Dundalke la primato de Irlando, Lia Kardinala Moŝto Mac Rory, priparolis la okazintaĵojn de la lastaj dudekkvin jaroj. "En la pasinto, li diris, ni tro priantis la politikon. Estis verŝajne nature, ĉar tiel longe ke popolo ne havas certan kontrolon pri siaj propraj aferoj, ĝi ne povas esperi fari ion bonan. Sed nun, kiam ni estas jam multon akirinta kaj atendante ke ni akiros ankoraŭ pli multe, ni streĉu niajn fortojn por realigi la jenajn aferojn por igi la popolon feliĉa kaj prospera. Por Irlando bona terkulturado, sanaj loĝejoj kaj virtaj homoj alportos tiun feliĉon kaj tiun prosperon. Via tasko estas rekonstrui la nacion, ĉar la lando kiu estas nomata Irlando, estis preskaŭ morta. Ni ne nur perdis komercon kaj niajn negocojn, sed ankaŭ nian komerc- kaj negocspiriton. Mi opinias, ke ĝi estus estinta morta antaŭ 1916 sen la potenca kaj viviga spirito de la Gaëlic League. Ni sennaciigas nin tre rapide kaj la Gaëlic League, lernante al granda nombro da homoj nerimarkite kaj senbrue iom pri ilia gepatra lingvo kaj pri la fora estinto de Irlando, estas donacinta al ili respekton por si mem kaj nacian fierecon."

Tiu lingvaĵo sonas tute alie ol tiu de formortinta Lia Kardinala Moŝto Mercier koncerne la Flandrojn.

INTER NI

El Aalst. — La Aalsta grupo "Pioniro" iĝis neŭtrala grupo, tio estas: ĉiu estas libera aboni ĉu je Belga Esperantisto, ĉu je Flandra, ĉu je kiu ajn revuo. 2/3 onoj el la membroj postulis tiun ŝanĝon.

S-ro De Kegel eksciĝis kiel prezidanto kaj la grupo elektis s-ron Van Daele, Schoolstraat, 10, kiel novan prezidanton.

El Sta. Nikolao. — *Al Triumfo.* — Ĉar gravajn sciigojn ni ne ricevis, ni komunikas nun la grupadresojn. Grupejo: Rubenspaleis, Ankerstraat; sekretario: s-ro Van Ghendt, Wegvoeringstraat, 75; kasisto: s-ro Beirens, Gasmeterstraat, 106. Nur al ĉi tiuj adresoj oni sendu sciigojn.

Laŭ la jam ricevitaĵaj aliĝoj multnombra deligitaro el Sta. Nikolao partoprenos la Flandran Kongreson; precipe la membrinoj estas plentuziasmaj.

Nia grupo organizos ekskurson al la lago de Overmeire, tre verŝajne dum Julio. La grupoj, kiuj intencas partopreni, sin turnu al nia sekretario meze de Junio.

El Ronse. La Paca Stelo. — La vivo de la grupo ankoraŭ pli kaj pli vigliĝas. Dum la monato de Majo okazis i. a. la 7an. kantvespero kaj la 21an. rakontado de s-ro Delfosse pri “Amo kaj Poezio” de Jan van Schoor. La 18an. de la sama monato ni ekskursis al Floesberg; estis tre amuza ekskurso.

Dum la monato de Junio okazos la 4an. kantvespero dum kiu estos lernata “La Tagiĝo”; — la 11an. kunveno, dum kiu raporto estos farata pri la ekskurso al “Floesberg-Bosch”; — la 18an. oni pri-traktos la malfacilaĵojn gramatikajn precipe de la participoj aktivaj kaj pasivaj.

La ekskursoj tre plaĉas al ĉiuj kaj jam oni proponis estontajn al “De Donck”, “Kluisberg”, k. t. p.

El Antverpeno. — *La Rekta Vojo.* — Dimanĉon la 20an. de Julio nia grupo intencas entrepreni sian laŭtradician boatekskurson al Vlissingen. Tiu ĉi dato estas la plej bona rilate la tajdon. Brila vetero jam estas mendita. Ni tre ŝatas la societon de aligrupanoj. Do, liberigu vin tiun tagon!

“La Verdaj Pedalkavaliroj” intencas fari 7 aŭ 9 tagan biciklan ekskurson tra Nederlando dum la dua duono de Aŭgusto. Kiu kuniros? Interesuloj por unu aŭ ambaŭ ekskursoj informu en la kunvenejo de nia grupo kafejo “Gulden Kroon”, Sint Jakobsmarkt, 14, ĉiun sabaton vespere post la 20a. horo.

Flandrema Grupo Esperantista. Kelkaj el niaj gegrupanoj partoprenis la ekzamenon organizitan de Flandra Esperanto-Instituto la 25an. de Majo. La saman vesperon okazis en nia “Pannenhuis” Intima Kunestado por malstreĉi la pafarkon. Muziko, sol- kaj kunkantado, deklamado, kino kaj dancado sin intersekvis: estis agrabla vespero kie estis io laŭ ĉies gusto.

Dum niaj lastaj kunvenoj ni laboris por la kongreso kaj tiamaniere volonte helpis nian kuraĝan sekretariinon, kiu lasttempe vere ne manĝis sian panon dum nenionfarado.

Nia grupo entuziasme aliĝis al la Flandra Ligo, en kies provizora estraro nia membro Edgard Verheyden estis elektita kiel sekretario.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.

La fondkunveno, kiu okazis en Gent la 18an. de Majo, estis vera sukceso: delegitoj el Aalst, Antwerpen, Brussel, Gent, Kortrijk, Lier kaj Sint-Niklaas ĝin ĉeestis.

Oni bone difinis la celon de la Ligo, projektis la skemon de regularo, preparolis la faroton propagandon, k. t. p. Pli detala raporto sekvos en nia proksima numero.

La kotizo por izolaj membroj estos 15.— frankoj kaj ĉiuj membroj ricevos *senpage* la organon de la Ligo: Flandra Esperantisto.

La elektita provizora estraro konsistas el: S-ro advokato Jozef Muys, Bornhem, prezidanto; S-ro Bernard Basleer, Verruelaan, 17, Kortrijk, kasisto; S-ro Edgard Verheyden, Klapdorp, 103, Antwerpen, sekretario.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.

Ĉiu verko estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto.)

Methodisch Leerboek voor de Internationale Taal Esperanto voor School- en Zelfonderricht door C. J. en J. C. Dirksen. Vierde, vermeerderde Druk. Utrecht, H. Honig, 1929, 92 paĝoj; 14×20 cm. Prezo: 0,65 fl.

Ne ekzistas taŭga flandra esperanta lernolibro kaj holandan niaj kursgvidantoj ne kuraĝas mendi...timante la prezon! Kaj tamen ĉu 0,65 fl., ĉu 10.— frankoj estas tro alta prezo por taŭga lernolibro? Ĉar taŭga ĉi tiu lernolibro estas laŭ ĉiuj vidpunktoj.

En 26 ĉapitroj, aŭ lecionoj se vi deziras, kun multaj ekzemploj kaj ekzercoj, la aŭtorinoj klarigas metode ĉiujn gramatikajn punktojn.

Bona ideo de la aŭtorinoj estis la klarigo de la gramatikaj konceptoj; ĉar jes, Esperanto estas facila, sed por tiu, kiu ankoraŭ ion scias pri gramatiko. Kaj ni konfesu, ke la plimulto el ni ne multe kunportis el la lernejo (al kiu la kulpo?) pri gramatiko.

Ne nur al la flandraj kursgvidantoj ni varme rekomendas ĉi tiun lernolibron, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volas mem, sen instruisto, lerni Esperanton, ĉar ekzistas por ili:

Vertaalde Oefeningen van het Methodisch Leerboek voor de Internationale Taal Esperanto (samaj aŭtorinoj, eldonanto kaj formato). Derde en vermeerde druk. 28 paĝoj. Prezo: 0,25 fl.

Ĝi enhavas ĉiujn esperantajn-nederlandajn kaj nederlandajn-esperantajn tradukojn. Tio ebligas kontrolon al la memlernantoj.

Wie Esperanto bij zich zelf leeren wil, gebruike beide hierboven besproken leerboeken.

Esperantista Akademio. Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. 1930. Eldonis: Paris. Esperantista Centra Librejo, 32 paĝoj; 11×16 cm. Prezo: 2 fr. fr.

La flandraj Lingva-Komitatoj distingiĝas per francaj adresoj! Estas ankoraŭ ĉiam s-roj van Melckebecke kaj Wytterick.

Bes-adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj 1929-1930. — 8a. eld. Eldonis: Bohema Esperanto-Servo. 84 paĝoj. 11×15 cm. Prezo: 1 Fsv.

RICEVITAJ REVUOJ.

Barcelona Stela, 15; Breiz Atao, 97, 98, 99, 100; British Esperantist, 301; Bulgara Esperantisto, 5; Dordrechta Esperantisto, 16; Esperanta, 3; Esperanto, Kiboŝa, 2; Esperanto (Nippon), 60; Espero Katolika, 79, 80; Hinda Esperantisto, 2; Holanda Esperantisto, 107, 108; International Language, 7; Litova Esperanto-Revuo, 4-5; Marto, 4; La Movado, 132; Ondo de Daŭgava, 4; Oomoto Internacia, 41-a; Pola Esperantisto, 4; Sennaciulo, 291; Svenska Esperanto-Tidningen, 4; La Unuigita Tuthomaro, 5; Utrechta Esperantisto, 3, 4.

SUBTENO POR NIA REVUO.

Johĉjo, Bruselo, 200.—; De B., Ronse, 100.—; Jan tro ricevis por sia vojaĝo al K. 9.+1.—, 10.—; Idealo ne industrio, 10.—; Gommer, 5.—; Amiko, 100.—; Estinta membro, 5.—; Joĉjo, 10.—; Lodema, 5.—; Engel, 5.—; Van Herzeele, 5.—; Laeremans, 5.—; Van Put, 5.—; Obstine antaŭen, 10.—; Gilson, 10.—; Van Biervliet, 20.—; Bassleer, 20.—; Debrouwere, 10.—; Cognie, 10.—; Mattelaere, 20.—; Kortrijkano, 10.—; Zamenhofano, 5.—; Vivu Flandra Esperantisto, 5.—; Flandraj fervojistoj, 8.—; Steevens, 5.—; Gust Vervloet, 10.—; Janssens, 25.—; Leve de Wildzang van lokaal Breughel, 5.—; Slechte vruchten zijn het niet waaraan de wormen knagen, 5.—; Olie drijft boven, 2.—; La rekta vojo estas la plej mallonga, 20.—; Doe wel en zie niet om, 3.—; Janssens, 6.—; Eerlijk duurt het langst, 10.—; De schoelie, 10.—; De schoelin, 5.—; Spaen, 2.—; Ribby Girl, 5.—; Lucifine, 3.—; pro Lourdes'a feliĉo, 2.—; Esperante, 4.—; G kaj E faros x, 1,40; Liane, 2.—; Spa citron, 1.—; Club B, 5.—; Buffalo, 1.—; Fonsken, 1.10; Kiam Jan denove venos? 2.—; Je proteste! 3.—; Bette, 2.—; Een ex-fourrier, 2.50; Mia ama kara, 3.—; Vivu Ameli', 1.—; Nooit, nooit! 2.—; **entute 756.— frankoj.**

Dankon. — Nia alvoko por subteno en nia lasta numero ne estis senrezulta, kiel pruvas nia nuna subtenlisto. Al ĉiuj: koran dankon! Ankaŭ al la Belga Ligestraro samon kompreneble pro la bonega propagando!

Niaj amikoj, kiuj ne jam sendis sian obolon, komprenu sian devon!

SCIIGU AL NI.

la adresojn de flandraj samideanoj, kiujn vi konas kaj ĉe kiuj ni povas propagandi por nia revuo kaj nia movado.

Flandra Esperanto-Instituto

Gravinstraat, 32
BORGERHOUT-ANTWERPEN
Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond

van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

Ĉiu literaturema esperantisto devas
posedi la belegan poemaron

AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor
kaj LA DU AMATINOJ

kun

LA KAPRICOJ DE MARIANO

de Alfred de Musset,

Tradukitaj de Jan van Schoor
kaj rekomendita de *Esperantista
Literatura Asocio.*

La prezo estas nur po 2 belgoj (send-
kostoj enkalkulitaj).

Ambaŭ verkojn mendu ĉe „Flandra
Esperantisto” aŭ ĉe „Flandra Espe-
ranto-Instituto”.

PAUL KUTSUKIAN.

Ĝenerala agento por la provincoj
Antverpeno, Okcident-kaj Orient-
Flandrujo de la aŭtomobiloj kaj
ŝarĝveturiloj

REO

Ĝenerala agento por la provinco
Antverpeno de la tirveturiloj

INTERNATIONAL

TELEFONOJ : 916.48 - 985.15

Laborejo kaj Ekspozicia salono :
BELGIËLEI 149, ANTWERPEN.

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmund, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet. Goede bediening.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat, 43, Berchem.

De Ley & Verschuere

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen
Zijde, Fluweel en Voeding.